

ALVOKO AL NETOLEREMO

Mons. Fulton J. Sheen

Oni diras, ke Amerikon turmentas netolere-
remo. Tiel ĝi ne estas. Ĝi suferas pro tolere-
mo: toleremo de bono kaj malbono, vero kaj
eraro, virto kaj peko, Kristo kaj degenero.
En nia lando ne tiom regas maltolereco kiel
pli ofte liberpenseco. La homo, kiu kapab-
las ĝuste ordigi la aferojn en la kapo tiel kiel
aranĝi la liton, estas signita kiel malvasthor-
izonta, sed tiu, kiu havas en pensado ĥaoson,
same kiel li ne kapablas eluzi sian tempon,
estas nomata tolerema kaj liberpensema.

Netolerema estas tiu, kiu rifuzas kion ajn
akcepti senmotive; liberpensema tiu, kiu ak-
ceptas ĉion el kiu ajn motivo, sen esplori, ĉu
la motivo estas ĝusta. Jes, ofte oni postulas
precizigon, sed tio estas laŭ sciencaj pre-
cizigoj, ne logikaj. Difejekto, kiu evidentiĝas
per menciita liberpenseco, estas anima, ne
la morala. Pri tio atestas tri aferoj: inklino
solvi problemojn pervorte, ne per argumen-
toj, senkondiĉa preteco akcepti aŭtoritaton
de kiu ajn en aferoj de religio kaj, fine, amo
al novaĵoj.

La religio havas rajton paroli per buŝoj
de siaj proparolantoj, same kiel tiun rajton
havas ankaŭ plujaj sciencoj, fiziko aŭ as-
tronomio, paroli per buŝoj de tiuj, kiuj pri ili
okupiĝas. La religio estas scienco, kvankam
iuj el ĝi volas fari nuran senton. La religio
havas siajn principojn, kaj naturajn kaj rev-
elaciitajn, kiuj en sia logiko estas ankoraŭ
pli komplikaj ol matematiko. Sed falsa kon-
cepto de toleremo tiun ĉi fakton mallumigas
al ĉiuj, kiuj, kvankam netoleremaj en la plej
banalaj vivbagatelaĵoj, iĝas toleremaj en sia
rilato al Dio.

Plua manifesto de la menciita difekto de
pensado, kiu elvokas strangan ŝimon de lib-
erpenseco, estas tiom forta entuziasmo por
novecoj, ke ĝi rifuzas eĉ amon al la vero. La
vero estas oferata al ironiaj rimarkoj, dieco
de Kristo al titoloj en lunda gazetaro. Mul-
taj nuntempaj predikantoj ĉiam pli malofte

sin dediĉas al predikado de Kristo krucumita
kaj multe pli sin dediĉas al sia populareco
ĉe kredantoj. Nesufiĉo da intelektuala verte-
braro kondukas al tio, ke krurdismete ili se-
las bovon de vero eĉ azenon de sensencaĵoj,
ili laŭdas katolikojn por „perfekta organiza-
do“ kaj seksologojn por „malfermita alvoko
de juna generacio“. Ĉar ili pli volonte fleksas
genuojn antaŭ homamaso ol antaŭ Dio, eĉ ne
eblas atendi, ke ili antaŭ nuntempa Herodo
defendus Johanon Baptiston. Al divorcoj
kaj la vivo en malĉasteco ili montras neniun
avertan fingron, neniun voĉo ektondras en
orelojn de riĉuloj, por ke ĝi eldiru tiujn ne-
tolerecajn vortojn de Dio: „Ne estas permes-
ite al vi havi edzinon de via proksimulo.“
Anstataŭ tio ni aŭdas: „Geamikoj, la tempo
ŝanĝiĝis!“ Acidoj de moderneco mordumas
fosiliojn de aŭtentikeco.

La kredo je Dio, dieco de Kristo, morala
leĝo estas opiniata pasema hobia. Tiu ĉi nova
tolereco verdire koncernas la veron mem,
kvazaŭ la vero estus iu modo, iu kvazaŭ
ĉapelo, sed ne la fundamento, kiu en tiu ĉi
komparo estas la kapo.

La lasta asertado de la nuntempa liber-
penseco estas, ke la vero devas komformi
kun tempo, kaj tial ĝi devas ŝanĝiĝi laŭ mo-
mentaj pasemaj deziroj. Kiel hameleono
adaptigas siajn kolorojn al ĉirkaŭaĵo, kiu
ĝin ĉirkaŭas, tiel laŭdire devus ŝanĝiĝi eĉ la
vero, por ke ĝi konvenu al vibroj kaj postuloj
de la tempo. Karaktero de certaj aferoj estas
firma, kaj por la vero tio des pli validas. La
veron oni povas milfoje rezisti, sed tio nur
konfirmas, ke ĝi estas tiel forta, ke ĝi trans-
vivos milajn atakojn. Kiam iu diras: „Tiu
asertas tion, la aliulo alion, tial neniun vero
ekzistas,“ estas tio preskaŭ samlogika, se
Kolombo konstatus, ke neniun tero ekzistas,
kvankam iuj homoj al li dirus: „La tero estas
globforma,“ kaj aliaj deklarus: „La tero es-
tas platforma.“ Tiu, kiuj rifuzas mezurilon

de objektiva vero, estas kvazaŭ ĉarpentisto, kiu forĵetus sian mezurilon kaj uzus kiel mezurilon ĉiun unuopan trabon: restas al ili nenio alia, per kio ili mezurus, nur transflugema modo de la aktuala momento.

Subrideta entuziasmo por novismo, sentimentala moviĝemo de devojigita menso kaj nenatura timo pro sufiĉe granda porcio de honesta pensado, tio ĉio kune kunformas grupon da nesufiĉkleruloj, sed des pli orgojlaj liberspirituloj, kiuj opinias, ke estas neniu diferenco inter Dio kiel Kaŭzo kaj Dio kiel „projekcio de mia memo“, kiuj starigas samnivelen Kriston kun Budao, kaj poste ili disvastigas sian liberpensemon ĝis vastigita sintezo, kiu ne nur diras, ke unu kristana konfeso estas same bona kiel la alia, kaj eĉ ke unu monda religio estas same bona kiel la alia. Granda dio „Progreso“ estas do altigita sur altarojn de la modo, kaj kiam oni ĝiajn entuziasmajn adorantojn demandas: „Por kio la progreso?“, oni ricevas respondon: „Por pli granda progreso.“ Prudentaj homoj dume miras, kiel povas ekzisti progreso sen indiko de ĝia direkto kaj kiel eblas indiki la direkton sen firma punkto. Kaj ĉar ili parolas pri „firma punkto“, tial oni diras, ke ili postrestas la tempon, dum ili fakte estas super la tempo, anime eĉ spirite.

Kion la mondo vidalvide al tiu ĉi liberpenseco bezonas, estas netoleremo. Ŝajnas, ke la mondo tute perdis kapablon distingi inter bono kaj malbono. Iuj kapoj opinias, ke netoleremo estas ĉiam malbona, ĉar laŭ ili ĝi estas esprimo de malamo kaj stulteco. Tiuj samaj kapoj kredas, ke la toleremo estas ĉiam ĝusta, ĉar ĝi laŭ ili estas esprimo de la amo kaj grandanimeco.

Kio do la toleremo estas? La toleremo estas sinteno, kiam ni pro gravaj kaŭzoj toleras malbonon, kio nin gvidas al tio, ke ni bremsas nian indignon aŭ la malbonon ni ne punas. Sed des pli grava estas tio, kion la toleremo koncernas: La toleremo koncernas nur la homojn, sed neniam la veron. La netoleremo koncernas nur la veron, ne la homojn. La toleremo koncernas eraranton, la

netoleremo eraraĵon.

La Eklezio nin en spirito de Kristo instigas, ke ni preĝu por tiuj, kiuj troviĝas ekster la Eklezio, kaj esprimu al ili pli grandan amon. Estas necese al la homoj esprimi amon, precipe al tiuj ekster ŝafejo, kiujn estas necese per la amo revenigi, por ke estu unu ŝafejo kaj unu Paŝtisto. Aŭ ĉu ni al Dio, kiu ne rigardas tolereme per egaligece vido ĉiujn religiojn, fornei lian nomon „Saĝeco“?

La Eklezio estas korpo de Kristo; per tio, kiam ĝi ĉiam pli pripensadis kaj pli profundigadis mem fundamentojn de sia instruo, ĝi disvolvadis ankaŭ pluajn kredverojn. Neniame ĝi tiujn verojn forgesis, ĝi memoris ilin kaj ĝia memoro estas tradicio. La ekleziaj dogmoj estas kiel firmaj, bonkvalitaj brikoj, el kiuj la homo povas konstrui, ne kiel pajlo de la „religia travivaĵo“, kiu konvenas nur por bruligo. La Eklezio ĉiam estis kaj estos netolerema, se temas pri rajtoj de Dio, ĉar herezo, eraro kaj malvero ne koncernas iujn personajn opiniojn, je kiuj ĝi povus rezigni, sed Dian rajton, pri kiu oni ne traktas. La vero estas dieca, herezo estas homa. Se herezulo pentas, la Eklezio lin akceptas reen en trezorejon de siaj animoj, sed neniam ĝi akceptos herezojn en trezorejon de sia saĝeco. La vero ĉiam restos la vero, eĉ se neniu al ĝi aliĝos; kaj eraro ĉiam restos eraro, eĉ se ĉiuj ĝin konfesus.

La sintenon de la Eklezio rilate al tiu ĉi ardanta demando de la nuntempo oni povas ekspliki per okazintaĵo de du virinoj, kiuj venis al Salomono, pro ilia juĝdecido. Ambaŭ ili asertadis, ke la naskiĝinta infano estas ŝia. La vera patrino insistis, ke ŝi volas la tutan infanon, aŭ nenion, ĉar la infano estas kiel vero, ne eblas ĝin dividi, sen tio, ke ĝi mortus. La falsa patrino male konsentis kun kompromiso. Ŝi konsentis, ke la infano estu dupartigita. Kaj la infano mem pro tiu grandanimeco mortus... ■

Fragmento el libro Old Errors and New Labels, Novjorko 1931.